

LA HEREDO DE LAPENNA

Eseo pri la bazaj konceptoj por la laboro de Universala Esperanto-Asocio

de Jens S. LARSEN

Antaŭ kvar jaroj, la 15an de decembro 1987a, forpasis Ivo Lapenna. Por memorfunebri ĉi tiun perdegon, kaj por alte proklami, ke kontraŭ homojn kiel li la morto mem estas senpova, LG publikigas la suban eseon, kies longecon pardonigos la fakto ke ĝi estas kvazaŭ kompletiga ĉapitro al la granda manlibro, kiu kuŝas en la bibliotekoj de ĉiuj memkonsciaj Esperantistoj, 'Esperanto en Perspektivo', ĉefverko de Ivo Lapenna.



Desegnaĵo de Megumie Komamura

ENHAVO

1. ENKONDUKO
2. ANALIZO
 2. 1 'INTERNAJ' KONCEPTOJ
 2. 2 CELOJ KAJ RIMEDOJ
 2. 3 NEŬTRALECO
 2. 3. 1. HISTORIA EVOLUO
 2. 3. 2. KRITIKO
 2. 4. UNIVERSALECO
 2. 5. LA MOVADO KAJ LA EKSTERA MONDO
3. KONKLUDO

Ĉi tiu eseo suplementas la ĉapitrojn 18. 2 kaj 23. 2 de *Esperanto en Perspektivo*.

1. ENKONDUKO

La 1987a jaro estis ne nur la centjara jubileo de Esperanto, sed ankaŭ la jaro kiam forpasis Ivo Lapenna, multmerita komitatano, estrarano kaj prezidanto de UEA ĝis 1974, en la civila vivo jugoslavdevena profesoro pri internacia juro en la universitato de Londono (Britio). Lian por-esperantan laboron kronis en 1973 *Esperanto en Perspektivo (EeP)*, 876-paĝa manlibro pri la historio kaj atingoj de la Esperanto-movado ĝis tiam; tiun verkon li ĉefredaktis kaj grandparte mem verkis. *EeP*, kun siaj 18 jaroj, ankoraŭ estas tre utila laborilo por aktivuloj en la Movado. Aparte valora ĝi estas, se oni mem zorgas ĝisdatigi ĝin kun referencoj al *Faktoj kaj analizoj pri la Internacia lingvo*, kiel tekstas la subtitolo de *EeP*. Mia intenco estis ke ĉi tiu eseo meritu tian referencon.

Estis tute neatendite, kiam Lapenna en 1974 en la UK en Hamburgo (Germanio) eksiĝis el ĉiuj postenoj kaj poste eĉ kiel membro de UEA. Por ekspliki tiun drastan elpaŝon li eldonis en 1975 la libron *Hamburgo en Retrospektivo* kun dua, kompletigita eldono en 1977. Tiu verko portas la ŝokan subtitolon *Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en UEA*, kaj el la enhavo vidiĝas ke temis pri puĉo en la Komitato, por elektigi komitatanojn fidelajn al Soveta politiko.

En la nuna situacio, kiam la Sovetiistoj ne plu kapablas puĉi eĉ en Sovetio mem, ŝajnas al mi ke estas la tempo ekzameni, kiajn ideojn Lapenna havis pri neŭtraleco, kaj ĉu ili restas konformaj al la bezonoj de la asocio kiu pretendas esti reprezenta por la esperantistaro kiel tuto: Universala Esperanto-Asocio. La ĉapitro 18. 2, kiun Lapenna mem verkis, traktas ne nur la neŭtralecon, sed tutan aron de parencaj ideoj. La ĉapitro estas titolita *Konstruado de la moderna UEA (1945-1973)*, *Bazaj konceptoj* kaj konsistas el la jenaj paragrafoj¹:

- 18. 2. 1 UNIVERSALECO KAJ NEŬTRALECO
- 18. 2. 2 UNUECO EN DIVERSECO
- 18. 2. 3 KUNLIGITECO KAJ INTERDEPENDECO
- 18. 2. 4 DEMOKRATECO KAJ MEMDISCIPLINO
- 18. 2. 5 CELOJ KAJ RIMEDOJ
- 18. 2. 6 SINTEZO DE KONTRASTOJ

Estas ne hazarde ke ĉiuj paragrafaj titoloj estas duopaj konceptoj, « dialektikaj kontraŭaĵoj »; Lapenna dum sia tuta vivo konservis kelkajn ideojn de sia Marksisma junaĝo. Li tamen neniel estis konsekvenca « historia materiisto », kiel montras jena frazo citita el la konkluda paragrafo 18. 2. 6²:

La bazaj konceptoj kune, en ekvilibra sintezo de kompleksaj interagoj estas la firma fundamento, sur kiu estas konstruita la moderna UEA.

Laŭ konsekvenca materiisma filozofio, estus pli atentinde ke tiu « fundamento » siavice mem estas fundamentita sur konkretaj, kelkfoje eĉ amaraj spertoj el la antaŭmilita Esperanto-movado, spertoj abunde dokumentitaj aliloke en *EeP*. Sed tiuj konsideroj ne multe gravas por la celo de ĉi tiu eseo.

1 Kelkajn el la konceptoj Lapenna traktis denove en ĉapitro 23. 2 (*Perspektivoj por la estonteco: Esencaj antaŭkondiĉoj por rapidigi la progreson*).

2 En la citaĵoj, rektaj krampoj ([]) signifas komenton de mi, kaj tripunkto (...) signifas ke mi ellasis ion de la citaĵo.

2. ANALIZO

Oni povas (sed Lapenna ne faris tiel mem) grupigi la koncepto-duopojn en unu grupon de konceptoj pri UEA-internaj rilatoj (la 2a, 3a kaj 4a el la paragrafoj) kaj alian grupon pri ekstera rilatado de UEA (la 1-a kaj 5a). Ĉar ĉiam estis pli da ekscitiĝo pri la « eksteraj » konceptoj ol pri la « internaj », ni rigardu la « internajn » unue.

2.1. “INTERNAJ” KONCEPTOJ

La plej afereca el la supre menciitaj paragrafoj estas 18. 2. 3, kiu simple diras ke UEA devas sinkronigi la laboron por Esperanto en ĉiuj kampoj (informado, instruado, aplikado) kaj sur ĉiuj niveloj (loka, landa, monda, faka), tiel ke la unuopa progreso ne limiĝu al sia originejo kaj poste forgesiĝu. La pacecon (kaj mallongecon) de ĉi tiu paragrafo bedaŭrinde kaŭzas eraro: la du konceptoj « kunligiteco » kaj « interdependeco » ne estas kontraŭaĵoj, sed praktike sinonimoj! Pli bone estus kunigi la du sub la titolon « organiziteco » kaj kontrastigi tion al « spontaneco ».

« Organizati spontanekon » povas unuavide ŝajni maleblaĵo, sed temas ja fakte pri la difino de kampanjo. UEA havis du grandajn kampanjojn post la milito: la unua kulminis la 10an de decembro 1954 en Montevideo (Urugvajo), kie Unesko establis « konsultajn rilatojn » kun UEA. La dua kulminis en Nov-Jorko (Usono) la 6an de oktobro 1966, kie delegacio de UEA transdonis proponon al UN okupiĝi pri la lingva demando. Malgraŭ amasa apogo (estis la plej granda peticio iam prezentita de privata asocio, kun preskaŭ unu miliono da subskriboj) kaj malgraŭ vigla partopreno de UEA en la UN-proklamita « Jaro de Internacia Kunlaboro » (1965), la propono ankoraŭ hodiaŭ ŝimas ie en la arkivoj de UN.

Nu, Lapenna ĉiam timegis defetismon (ne tute malprave), kaj eble tial evitis koncepti spontanekon kiel ion bazan por UEA; se ne venas pli-malpli tuja sukceso el spontana iniciato, homoj facile senesperigas. La malatingo en Nov-Jorko, kiu okazis malgraŭ modela organiziteco, ŝajne iom ekkomprenigis al li la rolon de spontaneco. Ĉapitro 18. 2 de *EeP* originas de 1954 aŭ eĉ pli frue, dum ĉapitro 23. 2 originas el la t.n. *Madridaj tezoj* de 1968. En paragrafo 23. 2. 1. 4 (*Spontaneco kaj signifo de organizita laboro: Daŭra modernigado de UEA*) li skribas:

UEA devos ankaŭ en la estonteco, eĉ pli ol en la pasinteco, subtenadi ĉiujn iniciatojn kaj agadojn favore al la Internacia Lingvo, kuraĝigadi la Esperanto-Movadon en kiu ajn formo, apogadi ĉiaspecajn utiligojn de la lingvo por praktikaj kaj aliaj celoj ekster siaj kadroj. UEA devas esti rigardata ne kiel memsufiĉa sed kiel instiga kerno de vasta moviĝo direktita al ĝeneraligo de Esperanto. Ĝia ekzisto estas nepre necesa, por ke iam ĝi fariĝu tute superflua.

Al do ĉi Raŭmisto replikus, ke ni rajtas fieri kaj ĝui la Esperanto-kulturon, « eĉ » se ni kredas ke UEA neniam sukcesos igi sin mem superflua. La Raŭma spirito, kiu akcentas la memvaloron de Esperanto, ŝajnas al mi necesa kompletigo al la Lapenna-pensoj pri organiziteco. Sen Raŭmismo, ordinara esperantisto estas preskaŭ sendefenda antaŭ defetismo, kaj sen « Lapenna-ismo » la memvaloro riskas degeneri en memsufiĉon. La ĝenerala malfido de Lapenna al spontaneco kaŭzis kelkloke, ke lia esprimmaniero ŝajnas iom rigora, kvankam oni apenaŭ povas malkonsenti kun la enhavo. Ekzemple paragrafo 18. 2. 4 (pri demokrateco kaj memdisciplino) citas du admonajn kongresajn paroladojn, unu de Zamenhof kaj unu de Lapenna mem; el la lasta ni citu:

Movado militanta kiel la nia, movado militanta sur la kultura kampo, povas progresi ne per sterilaj disputoj, sed per grandaj fortostreĉoj por plenumi demokrate voĉdonitajn decidojn, kiuj samtempe signifas libervole akceptitajn sindevigojn.

Tamen oni komencas kompreni la motivojn de la rigoreco, kiam oni legas jenan ĝemon el paragrafo 18. 2. 2 (pri unueco en diverseco):

Espereble iam venos la tempo, kiam la tuta membraro senescepte komprenos, ke ne la

malsameco de politikaj kaj aliaj ideoj obstaklas la unuecon, sed unuflanka altrudado de siaj propraj tiaspecaj konceptoj kiel ekskluzive validaj por la tuta UEA.

La duopo unueco/diverseco havas multon komunan kun memdisciplino/demokrateco (ankoraŭ 18. 2. 2):

La vasteco de UEA precipe reliefiĝas, se oni komparas ĝin kun la aliaj internaciaj privataj unuiĝoj, la t.n. neregistaraj organizaĵoj.... En aliaj organizaĵoj, precipe en la pli grandaj, la reciprokaj kontaktoj de la membroj, aŭ la rilatoj inter ili kaj la internaciaj organoj de tiuj asocioj, estas minimumaj aŭ eĉ nulaj, ĉefe pro la lingva obstaklo; tial ĉio, aŭ preskaŭ ĉio, fakte troviĝas plene en la manoj de iliaj gvidaj komitatoj.

Bedaŭrinde, tio signifas ankaŭ ke pli da fuŝuloj povas miksi sin en la laboron. Lapenna multe pli timas tiujn, kiuj pro nekomprene aŭ nekono pri malsamecoj trudas al la asocio siajn ekstremajn starpunktojn, ol tiuj kiuj konscie misuzas la diferencojn: la lastajn oni povas senmaskigi, sed kion fari kun sinceruloj? Oni povus kredi, ke li ŝanĝis sian opinion pri tio en 1974 pro la puĉo en Hamburgo, sed laŭ *Hamburgo en Retrospektivo* la konsciaj, Sovetiismaj puĉistoj neniam sukcesus sen la helpo de malvast-perspektivaj Lapenna-malamantoj. La paragrafon 18. 2. 2 de *EeP* Lapenna finis per la frazo:

La du devizoj – « Unueco estas forto » kaj « Per UEA al la fina celo » – plu restas validaj.

– sed iom supre ni trovas ankaŭ:

Mortigo de neŭtraleco egalas al mortigo de unueco.

Do, post kiam neniĝis la neŭtraleco, Lapenna ne plu vidis sin kapabla daŭrigi en UEA. Sed kiel do Lapenna komprenis la koncepton neŭtraleco, kiu ŝajnas esti ŝlosilo por kompreni la tutan sencon de UEA?

2.2 CELOJ KAJ RIMEDOJ

Se universaleco estas la celo (ĝi finfine estas la U de UEA!), tiam neŭtraleco estas la rimedo. Simile oni povas rigardi la asocion kiel rimedon kaj la lingvon kiel la celon³. La bazajn konceptojn por la laboro de UEA ni do povas resumi en la jena tabelo:

‘EKSTERAJ’ KONCEPTOJ

RIMEDOJ	CELOJ
ASOCIO (UEA)	LINGVO (ESPERANTO)
NEŬTRALECO	UNIVERSALECO

‘INTERNAJ’ KONCEPTOJ

UNUECO	DIVERSECO
MEMDISCIPLINO	DEMOKRATECO
ORGANIZITECO	SPONTANECO

³ Eventuale ankaŭ la « internaj » konceptoj dividiĝas en unu grupon da « rimedaj » kaj alian da « celaj », sed tion mi ne prilozofiiis ĉi tie.

Estu jam tute klare, ke oni ne povas subordigi la rimedojn al la celoj! Unue ĉar ni esperantistoj faras celon el io normale rigardata kiel rimedo, nome la lingvo. Due, kiam organizaĵo funkciis dum sufiĉe longa tempo, ĝi vole-nevole akiras ankaŭ la celon de memkonservo, alivorte la distingo inter rimedo kaj celo ne ĉiam eblas. Kaj trie, ja nenio malhelpas la rimedojn esti multe pli debateblaj ol la celoj kiel en la kazo de neŭtraleco kaj universaleco.

Lapenna evidente ne vidis ripetiĝon de la duopo celo/rimedo en universaleco/neŭtraleco kaj lingvo/movado; en *EeP* li traktas aparte la universalecon de UEA kaj la neŭtralecon de la lingvo, kun la rezulto ke la rilato inter la du konceptoj en paragrafo 18. 2. 1 iom malklariĝas. En paragrafo 18. 2. 5 Lapenna rezonas jene pri celoj kaj rimedoj:

La rimedoj estas funkcio de la celoj....En konstitucia akto (t.e. statuto) de kiu ajn organizaĵo la celoj kaj rimedoj estas la plej esenca parto: oni fondas ian organizaĵon por atingi per komunaj fortoj difinitajn celojn, aplikante difinitajn rimedojn laŭ interkonsentitaj metodoj. Tial, kiu ajn konstitucia akto de privata organizaĵo Havas karakteron de siaspeca kontrakto, kaj ĝuste tial ĝi estas deviga por la membroj.

La iom severa vortuzo pri la simileco inter statuto kaj kontrakto enkondukas diskuton pri ebleco eksigi membron⁴, kvankam tio pli hejmus en paragrafo 18. 2. 4 (pri demokrateco kaj memdisciplino). Alia ero, kiu ankaŭ estas tute ne trafe formulita, estas la vidpunkto pri la rimedoj kiel funkcio de la celoj. Cetere oni povus opinii ke mankas paragrafo pri la koncepta duopo lingvo/asocio, sed pri tiuj fakte temas la aliaj ĉapitroj de *EeP*.

2.3 NEŬTRALECO

2.3.1 HISTORIA EVOLUO

La statutoj de UEA neniam traktis neŭtralecon kiel specon de rimedo, sed pli kiel necesan malbonon. La origina UEA-statuto de 1908 tekstis: « UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco ». La ideo estis, ke se UEA estu por ĉiuj (do universala), tiam ĝi ne povas favori unu flankon en kazoj de socia konflikto. Tio estas la pasiva flanko de neŭtraleco, kaj dum la jaroj aldoniĝis « sociaj demandoj », « raso » kaj « sekso » kiel kampoj, en kiuj UEA tenu sin neŭtrala. La lasta statut-ŝanĝo (de 1979) eĉ eksplicite aldonas, ke « Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj ».

Sed ekzistas aktiva flanko de neŭtraleco, kaj tiun flankon Lapenna reprezentis pli ol iu alia. La diferenco al pasiva neŭtraleco plej karakterize montriĝas en la sinteno al ŝovinismaj persekutoj kontraŭ Esperanto: pasive oni hontas kaj klopodas kaŝi la internaciecan karakteron de Esperanto, aktive oni fiere prenas la persekuton kiel ian « inversan agnoskon ». Aktiva neŭtraleco malbone harmonias kun la nun valida statuto de UEA, sed jam la statuto kiu validis en 1973 estis ne tute taŭga. Pri la aldono de neŭtraleco en « sociaj demandoj » (UK en nazigermana Kolonjo, 1933) Lapenna skribas en paragrafo 18. 2. 1. 2 de *EeP*:

Nur la senespera deziro eviti malagrablajojn por la Movado kaj por si mem povas ekspliki tiun absolute maltaŭgan aldonon. Ĉiu lingvo inkluzive Esperanton ja estas socia fenomeno... Nur pretervido kaŭzis, ke en 1947, kiam [dum la UK] en Bern la Komitato reformulis la principon en atmosfero de sufiĉe granda streĉiteco, tiu ereto restis en la statuto. En ĉiu okazo la vortoj « rilate al politiko » ja abunde kovras la neŭtralecon koncerne kian ajn apartan partipolitikon, ĉu socialisman, ĉu nesocialisman.

Tamen, en Bern (Svislando) oni ankaŭ faris pli taŭgan aldonon, nome pri respekto al la homrajtoj kaj tio okazis unu kaj duonan jaron antaŭ ol UN proklamis la Universalan Deklaracion de

⁴ Tio fakte okazis unu fojon en UEA post la milito. En 1956 oni eksigis la prezidanton de la Usona Esperanto-asocio, ĉar li dum du jaroj Makartisme (t.e. absurde) denunciadis UEA-n esti infiltrita de stalinismo kaj titoismo – samtempe! Laŭ Lapenna, UEA preskaŭ komplete perdis la du jarojn pro tiu afero.

Homaj Rajtoj! Tion Lapenna rigardis kiel necesan limigon de la neŭtraleco:

La neŭtraleco ĉesas tie kie komenciĝas la malobservo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kiel formulitaj en la Universala Deklaracio... [kaj] kie komenciĝas atakoj kontraŭ Esperanto... eĉ ekster la malobservado de la Universala Deklaracio.

Kaj jen pri la praktikaj konsekvencoj:

En sia multflanka laboro por Esperanto UEA aplikis en la praktiko la principon de aktiva neŭtraleco dum la lastaj 25 jaroj [t.e. 1948-1973]. ... Ĝi aligis siajn fortojn al la klopodoj de UN, Unesko kaj aliaj organizaĵoj en la lukto kontraŭ rasismoj kaj rasan diskriminacion. Sed UEA aldonis tute apartan kontribuon per sia batalo kontraŭ la lingvan kaj ĝenerale kulturan diskriminacion, kontraŭ kulturan genocidon aŭ memmortigon. Ĝi estis la unua, kiu atentigis pri tiu formo de diskriminacio jam en 1965 okaze de la malkovro de la Zamenhof-monumento en Linz, Aŭstrio. Dum la tuta jaro de Internacia Kunlaboro (1965) kaj poste la demando estis esplorata kaj prilumata el ĉiuj flankoj, tiel ke baldaŭ progresemaj fortoj ankaŭ ekster la Esperanto-Movado komencis studi ĝin kaj uzi la terminon kultura kaj lingva diskriminacio.

Interesa estas la daŭrigo:

Interne de la Asocio la principo estis aplikata prudente elaste. ... Io kio estas rigardata kiel tute normale neŭtrala en unu politika medio, povas esti konsiderata kiel politike neneŭtrala en alia medio.

Oni sentas la pason de la tempo. Siatempe UEA devis ponti ne nur inter diktaturo kaj demokratio, sed ankaŭ inter dekstraj kaj maldekstraj diktaturoj, jam interne de Eŭropo. Nuntempe la konceptoj pri politika normaleco harmoniiĝas en la tuta mondo, kaj kio antaŭ kelkaj jaroj povis kaŭzi ideologian kverelegon, tio hodiaŭ estas banalaĵo. Oni povas eĉ suspekti, ke la neŭtraleco kaj aliaj bazaj konceptoj de UEA jam pli frue estis sentataj tiel banalaj en okcidenta Eŭropo, ke tio kunkaŭzis la malrapidan, sed persistan malkreskadon de la Esperantistaro tie dum la sesdekoj kaj sepdekoj. En la UK en Londono (1971) oni okazigis debaton pri neŭtraleco, kiu elvokis grandegan interesiĝon ĉe homoj el ĉiuj politikaj konvinkoj kaj sistemoj. Malgraŭ tio, ŝajne neniu povis diri ion esence novan pri la temo, kaj la ĝistiamaj konceptoj pri neŭtraleco ricevis klaran konfirmon.

Certe precipe la junularo sentis la neŭtralecon banala, kaj tio povas ekspliki kial ne nur la ŝtat-aprobitaj orienteŭropaj TEJO-funkciuloj, sed ankaŭ kelkaj el okcidentaj landoj kunlaboris en la kontraŭneŭtraleca komploto (malamo al la persono de Lapenna ŝajne ne karakterizis TEJO-n). La rezulton, tamen, ili apenaŭ antaŭvidis: UEA restis neŭtrala, sed nun en la senco « lojala al iu ajn kiu momente havas la regon » – do pasive neŭtrala, kiel antaŭ la Dua Mondmilito: la Hamburga komploto tiusence efektive estis pli kontraŭaktiva ol kontraŭneŭtraleca.

2.3.2. KRITIKO

Laŭ la koncepto de Lapenna, indus do mencii nur kvar kampojn de neŭtraleco en la statuto de UEA: nacieco, raso, politiko kaj religio. Ju pli konciza oni povas fari statuton, des pli bone. Tial oni ankaŭ povas ellasi la neŭtralecon pri sekso, ĉar seksa diskriminacio estas speco de rasismo, almenaŭ se oni konceptas rasismojn kiel diskriminacion surbaze de anatomiaj karakterizaĵoj. Kaj se oni foje ekkonceptis neŭtralecon kiel malpermeson je diskriminacio, tiam oni jam devus aldoni klaŭzojn pri handikapoj, aĝo, ekonomia stato kaj tiel plu senfine. Pli bone estas distingi inter unuflanke la neŭtraleco kiel rimedo per kiu la kolektivo UEA difinas sin, kaj aliflanke la rajto ne esti diskriminaciata, kiel individua homa rajto, difinita de UN (kaj agnoskita de UEA kiel memkompreneblaĵo).

Tamen la koncepto « aktiva neŭtraleco » kiel formulita ĝis nun havas vundeblan punkton. Lapenna mem atentigis (en *EeP*, paragrafo 23. 2. 7. 6: *Suvereneco neaplikebla*) ke:

UEA estas nek ŝtato, nek federacio nek konfederacio de ŝtatoj. Tial, apliki al ĝi, aŭ al la organizaĵoj, el kiuj ĝi konsistas, la ideon de suvereneco, aŭ kiun ajn alian principon de ŝtata organizo, kiel kelkaj klopodis fari, estas esence erara kaj misgvida. ... UEA estas socia-kultura organizaĵo, libervole formita por progresigi la celojn formulitajn en la Statuto.

Ĝuste tial ne estas ĝuste, diri ke la aktiva neŭtraleco ĉesas tie kie UEA devas reagi kontraŭ io. Fakte temas pri tio, ke ni ekpostulas ion de aliaj instancoj, por ke UEA *konservu* sian neŭtralecon. Al ŝtato, neŭtraleco signifas ĉefe eksteraliancecon, sed al asocio kiu pretendas esti interesa en ĉiuj partoj de la mondo, la neŭtraleco nacia, rasa, politika kaj religia nur povas signifi respektive kontraŭrasismen, plurismen kaj klopodadon al toleremo. Kaj UEA devas direkti sin laŭ tiuj principoj, ne nur ĉar ili estas subtenindaj per si mem, sed ankaŭ ĉar la Internacia Lingvo per sia nura ekzisto prezentas objektivan minacon al principa maltolero inter nacioj, rasoj, kaj politikaj kaj religiaj partioj. La tasko de UEA do estas evidentigi kaj efektiviĝi tiun « minacon » – plene observante la regulojn de ordinara ĝentileco, kompreneble!

Dum la tempo de Lapenna, la plej kriza kampo de neŭtraleco estis la politika, sed en la longa daŭro, la religia neŭtraleco estos la plej obstakla. Oni povas difini religion kiel ian gramatikon de moralo. Kiel lingva gramatiko difinas por ni, kio estas senca kaj kio ne, tiel religio difinas, kio estas ŝerco kaj kio estas insulto. Scienco male nek ŝercas, nek insultas, sed principe postulas ke oni povu salti de unu konvinko (aŭ paradigmo) al kiu ajn alia, tiel rapide kiel oni povas klaki per la fingroj. Scienco en si mem do apenaŭ taŭgas kiel baza idearo por io ajn, eĉ se oni eble povas utiligi sciencon konstruante ion tian. Religio akcentas la eternajn valorojn, kaj tiel rezultigas malpli da konfliktoj ol scienco – kondiĉe ke oni pretas toleri ke ne ĉiuj homoj havas la saman religion, kaj komprenas sciencon kiel senkompromisan serĉadon por la vero⁵. Oni povus opinii ke estus pli simple tute rifuzi la nuran ekzistorajton de religiaj kaj naciaj diferencoj, se ne tuj, do en longa perspektivo – kaj tiun sintenon fakte prezentas SAT, Sennacieca Asocio Tutmonda. Pro pluraj kaŭzoj tio ne povas esti la opinio de UEA: unue ni devas labori kun UN kaj Unesko, kaj tiuj bazas sin sur la principo de nacia suvereneco. Due, la sintenon de tiu ĉi ni pri tiu demando forte influas la cirkonstancoj en tiuj lokoj kie ni vivas – kaj kiom valoras sennaciismo, se ĝi estas pli tipa por iuj nacioj ol por aliaj? Simile oni ja vidas ke ateistaj kristanoj, judoj ktp restas kristanoj kaj judoj, eĉ se ili ne plu sentas sin religiaj. Norda Irlando kaj Jugoslavio estas aktualaj ekzemploj, ke sekularigo kaj komuna lingvo ne nepre sufiĉas por krei pacon.

Ni do konkludu, ke ĉiu religio estas egale « bona »; iliaj nunaj ecaroj estas hereditaj, sed nur la respektivaj religianoj mem povas decidi kiuj ecoj restos karakterizaj por la respektivaj religioj kaj tio validas kaj por la bonaj ecoj kaj por la malbonaj. Ekzemple, bona eco de universalismaj religioj kiel kristanismo aŭ islamo estas, ke ili rekonas ian egalecon de ĉiuj teranoj sub Dio; la koresponda malbona tendenco estas la opiniado, ke homoj pli proksimaj al Dio havas regorajton super la malpli proksimaj! Iom malsimile estas pri lingvo, ĉar ĝi ne estas tiom antaŭracia kiel religio. Sed per tio ni jam komencis la diskuton pri universaleco.

2.4 UNIVERSALECO

La koncepto de universaleco ŝajne neniam estis pasie debatata en UEA. La kaŭzo povas esti ke SAT prenis sur sin la diskuton, tiel ke UEA povas prezenti sin kiel la organizaĵo kiu intencas daŭre respekti la naciajn diferencojn – almenaŭ al la ekstero! Lapenna jene rezonas pri universaleco:

La Internacia Lingvo... formiĝis en la ĝusta historia momento kaj nun ruliĝas sur tiu vasta kaj longa evoluvojo, kiu elbestigis la homon kaj ekde tiam kondukas la homaron de la iama disrompiteco en formo de hordoj, gentoj, triboj – tra ĉiam pli vastaj sociaj grupiĝoj, tra la nunaj nacioj-ŝtatoj kaj interŝtataj kuniĝoj – al estonta tuthoma, universala socio.

5 Eble mi aldonu, ke mi persone ne havas religian kredon – almenaŭ ne en konfesebla formo.

Lapenna konsekvence identigas Esperanton kun « la » internacia lingvo, kaj li insistas ke tio ne estas nura fido, sed science ĝusta. Certe, UEA apenaŭ kapablas labori sen tiu hipotezo, sed laŭ Raŭmismo vidpunkto Lapenna eble iom tro dependigas nin al ĝi. Pli problema estas la opoziciigo inter besto kaj homo, kaj la jena iom pli posta tekstopeco konfirmas nian timon:

Foje unuiĝinta, la estonta tuthoma socio evidente ne povos starigi sin kontraŭ samkarakteran socion, ĉar tia tutsimple ne ekzistos; sed ĝi ja povos kaj devos mobilizi ĉiujn fortojn por kontraŭbatali mizeron kaj seriozajn danĝerojn minacantajn eĉ la vivon mem sur nia terglobo, utiligi la akumulitajn sciojn por plia subigo de la naturo kaj por ekspluatado de ĝiaj senfinaj riĉaĵoj en la intereso de ĉiuj.

Lapenna evidente opiniis, ne nur ke la evoluo al universala socio distancigas la homon de la naturo, sed ankaŭ ke tio estas pozitiva atingo. Denove oni sentas la pason de la tempo. Klare, la riĉaĵoj de la naturo ne plu estas senfinaj, kaj hodiaŭ eĉ impresas absurde, prezenti la « subigon de la naturo » kiel ion kontraŭan al « danĝeroj minacantaj la vivon mem », kvankam Lapenna per tio verŝajne celis atomarmilojn.

Evidente, la universaleco de UEA nuntempe fariĝas problemo same aŭ eĉ pli debatinda ol la neŭtraleco. En la ĉi-supra citaĵo, la distancigo de la naturo estas preskaŭ nedisigeble ligita al la malapreza sinteno al la « iama disrompiteco » de la homaro. Sed post la fina venko, kio okazos al la naciaj lingvoj, se ne paroli pri la dialektoj? Se ili fine malaperos, ĉu tiam ni vere bezonis evoluigi novan lingvon por la tuta mondo (=Esperanto), ĉu ne sufiĉus adopti la almenaŭ kvante plej evoluintan nacian kulturlingvon (=la angla)? Se la mondlingvo estas sola lingvo, ja ne gravas ĉu ĝi estas malfacila!

EeP ne sukcesas doni klaran respondon al tiuj demandoj, kvankam Lapenna plurloke esprimis sin kontraŭ « kultura memmortigo », k.s. Tamen restas ne klare, du ekzemple la malaperado de dialektoj klasiĝas en tiun kategorion – oni povus eĉ suspekti ke Lapenna pli vidus tion kiel *natura* memmortigo. Baldaŭ aŭ poste, iam ni devos eldiskuti la alternativon inter unuflanke Norvega « natura » modelo, kaj aliflanke Franca « kultura » modelo (Norvegio havas du normajn lingvojn por pli bone reprezenti la dialektojn en la bazlernejoj, kvankam tiuj du kaj la Dana kaj la Sveda fakte estas dialektoj inter si; en Francio oni traktas eĉ la Bretonan kiel dialekton, kvankam ĝi apartenas al alia lingva familio ol la Franca).

Se la advokatoj por la « Franca » modelo montros natur-koncepton similan al tiu de Lapenna en 1973, tiam UEA certe devus aktive apogi la « Norvegan » modelon. Tio do signifus respekton ne nur al normaj lingvoj, sed ankaŭ al la dialektoj, kaj ne nur nun, sed ankaŭ estonte. Oni povus nomi tion « discentrismo universaleco », kio tiel farigas streĉita nocio simile al « aktiva neŭtraleco ». Tio ankaŭ signifus ke la Esperanto-movado devus helpi peradon inter homo kaj naturo, same kiel ĝi jam peras inter homoj el malsamaj kulturoj. Sed tiu tuta diskuto estas nur ĵus komencita.

2.5. LA MOVADO KAJ LA EKSTERA MONDO

Alia diskuto, kiu nature kreskas el la debato pri universaleco, estas la sinteno (aŭ indiferento) fare de UEA pri la ŝtata organiziĝo de la mondo. Mi ne kredas (malkiel i.a. la redaktoro de *La Gazeto*), ke la laŭŝtata organiziĝo estas la kerna problemo en la nuna Esperanto-Movado. Por organizo gravas ne nur komuna lingvo, sed ankaŭ komunaj valutoj, poŝto, leĝoj pri societoj kaj subvencioj al civitanaj iniciatoj, kaj tiel plu. La hodiaŭa realo prezentas evoluintan naciŝtatan organizon kun ne tro multe da interŝtata kunordigo, kaj al tio ni vole-nevole devas akomodi nin. Alia afero estas ke la unuopa nacia Esperanto-asocio devus aparte aktivi rande de la ŝtato: en la limregionoj, inter enmigrintoj, eĉ etnaj minoritatoj. La plej efikan helpon al ĝeneraliĝo de Esperanto ni donas, kiam ni povas konduki kvazaŭ ĝi jam estus okazinta, kaj tiajn situaciojn oni kreas plej facile tie, kie la « normalaj » naciŝtataj kondiĉoj ne plene validas. Neniu ŝtato (aŭ alia socia kuniĝo)

estas pli montra ol ĝiaj anoj faras ĝin, sed ŝtatoj kompreneble povas impresi des pli montraj, ju pli malproksime oni mem vivas de la ŝtata centro.

La nocio pri ŝtato evoluas paralele al tiuj pri scienco, lingvo kaj religio. En la mezepoko, la normala imago pri scienco estis tiu, ke ĉiaj scioj jam estas skribitaj en la libroj. Nuntempe « ĉiuj » scias ke sciencistoj produktas novan scion ĉiutage. Simile pri la ŝtato: en moderna demokratio, apenaŭ iu rigardas la ŝtaton aŭ ĝian registaron kiel ion nature aŭ Die donitan, kvankam oni preferas laŭeble suprenŝovi la respondecon (kaj la kulpon). Pri la lingvo, la popola imago ne estas tiel evoluinta; multaj kredas ke la lingvo estas io « natura », kion oni sekve ne povas « arte » prifari. Estas komiko sur sufiĉe alta nivelo, kiam eĉ edukitaj personoj tion memvole asertas en la nuna epoko de genetika manipulado. Do, hodiaŭ la esperantistoj pli-malpli konscias, ke la homo mem faras (kaj rajtas fari) siajn sciencon, ŝtaton kaj lingvon, menciitaj laŭ kreskanta kolektiveco en la decidado (kaj malrapideco en la efektivigo). Ni devas klopodi ĝeneraligi tiun konscion, kaj enmeti la nocion « religio » en la kvaran lokon de la listo.

Eble estas jam tempo diskuti, eble ne nur kiel aranĝi la Esperanto-movadon, sed la tutan mondon. Fakte, laŭ mia opinio, internaciistoj kiel ni iam nepre devas prezenti iajn pensojn pri novtipa, internacieca ŝtatformiĝo, se ni ne preferas adiaŭi al la reala mondo kaj fariĝi anarkiistoj (kaj pri tiuj okupiĝu SAT, mi parolas ĉi tie kiel UEA-ano). Mia persona utopio estas la jena: ni havos superpotencojn kaj subpotencojn, kaj ĉiu subpotenco membris en precize du superpotencoj; ekzemple subpotenco Danio membris en Eŭropa kaj Arkta superpotencoj (la lasta ampleksos pli-malpli la landojn ĉirkaŭ la Norda Poluso). Sian teritorion ĉiu superpotenco do havos komuna kun aliaj superpotencoj (ekzemple la Arkta konsistos el Eŭropa, Nordamerika kaj Soveta partoj). En UN, ni konservos la instancojn kiel la Konsilion de Sekureco kaj la Ĝeneralan Asembleon, sed ili redifiniĝos kiel reprezentantoj de la super- kaj subpotencoj respektive.

Tia aranĝo bezonas kompletan revolucion en la pensoj pri nacia suvereneco (ne simplan rifuzon), sed se ĝi estos farebla, ĝi rezultigos tre stabilajn kaj demokrate regeblajn internaciajn rilatojn. Mi eĉ suspektas, ke tia debato necesas por akiri finan verdikton en la disputo pri landonomoj. Tiu afero ne estas pure lingva, sed ankaŭ tuŝas niajn imagojn pri la rilato inter la nacioj, kaj inter ŝtato, nacio kaj popolo.

Eĉ se ne eblos al UEA preni starpunkton pri tia nova mondordo, ni povos utiligi la pensojn en la konstruado de UEA mem. Ĉiu landa membroasocio de UEA havu la eblecon aliĝi al ĝis du « kontinentaj grupoj », kie ili havos pli da devoj ol alie kaj pagos pli altan kotizon. Unu devo povus esti adopti unu el la asocioj ne ligitaj al kontinenta grupo kaj helpi al ĝi ekplenumi la kondiĉojn por membriĝi. Unu tia kondiĉo povus esti la kapablo efektive plenumi taskojn kiujn oni prenis sur sin. Kompense oni povus doni pli altan rekompencan al la plej laborŝarĝitaj funkciuloj de la kontinenta grupo, ol UEA mem povus doni. La tuta novtipa organizado celus malpliigi la abismon inter la altegaj idealoj de la Movado kaj la nekontesteble tre hobia karaktero de la laboro de UEA. Ni ricevos asocion « en pluraj rapidecoj », sed se la pli rapidaj konscias pri sia respondeco antaŭ la malpli rapidaj, mi-vidas nenion malbonan en tio. La landaj reprezentantoj en la UEA-komitato povus organizi tiajn « kontinentajn grupojn » tute sen interveno de la Estraro, kaj eble la tuta debato pri novaj formoj de internacia kunlaboro pli hejmas en *Monato* aŭ *La Gazeto* ol en la kadroj de UEA, almenaŭ dum la ideoj estas tiel skizaj kaj malmaturaj kiel ĉi tie.

Ĝuste por havi kovejon for tiaj ideoj, UEA devus pli multe apogi unu aŭ ambaŭ el la du menciitaj gazetoj: ĉu reklamante por ili, ĉu abonante pli da ekzempleroj ol kiom bezonas Biblioteko Hodler. En la kazo de *Monato* estas ankaŭ pli perspektiva kaŭzo de apogo. Al Eŭropo mankas komuna debato. Malmultaj, se iu, havas samtempan superrigardon pri la plej brulaj demandoj en ekzemple Svedio, Portugalio kaj Hungario, eĉ se oni diskutas la samajn internaciajn eventojn, la graveco atribuita kaj la reagoj povas esti tute malsamaj. Ĉi tie Esperanto ludas rolon kiel lingvo de demokratia debato. La anglalingva laŭreklame tut-Eŭropa ĵurnalo *The European* ja malsukcesis kiel

novaj komunikilo por Eŭropanoj, sed montriĝis tre taŭga kiel informilo por Eŭrope orientitaj Britoj! Estas grave por ĉiuj socie interesitaj homoj (kaj en demokratio ni ĉiuj estas tiaj) ke la komunikado en kaj pri la koncerna socio okazu en lingvo, kiun ĉiu sentas kiel sia. Pro tio oni trovas en landoj kiel Norvegio kaj Danio pasiajn EK-kontraŭulojn, kiuj samtempe estas inter la plej demokrate kaj internaciisme pensantaj homoj. Bedaŭrinde la Movado ne asertas sin tiom en la publiko, ke ekzemple tiaj homoj ekvidu la eblecojn en Esperanto.

3. KONKLUDO

La celo de ĉi tiu eseo estis diskutigi, kiel certigi ke la Esperanto-movado ankaŭ estonte povos avangardi. Ja ne multe utilas Esperantigi multajn homojn, se ili nenion estonte perdas kabeante. Sen avangardeco en la aktualaj mondodemandoj, la Movado allogos nur tiujn kiuj en Esperanto trovas vivkonsolon; kaj kvankam estu loko por ili ankaŭ – alie ni grave malobservus la principon de universaleco – ili ne estu la sola speco de Esperantistoj.

Kiel vidite, en 1947 UEA avangardis pri homaj rajtoj, kaj en 1965 pri lingva kaj kultura diskriminacio. Hodiaŭ la Esperanta avangardo ne estas interne de UEA; en tio estus nenio malbona, se UEA jam estus tiu « instiga kerno », kiun Lapenna antaŭvidis. Ke ĝi ankoraŭ ne estas, kulpas parte la postefikoj de la puĉo de 1974 (kiu nun komplete perdis sian signifon), parte la diversaj breĉoj en tiu baza konceptaro, kiun ni heredis de Lapenna. Diversaj instancoj klopodas ŝtopi tiujn breĉojn: *Literatura Foiro* pri spontaneco, *La Gazeto* pri neŭtraleco, Akademio Internacia de la Sciencoj pri universaleco. Sed nur UEA povos rilatigi la atingojn de tiuj instancoj al la bezonoj de la tuta Esperantomovado.